

**HENRIK IBSEN**

# **LA ASOCIO DE LA JUNULOJ**

Dramo en kvin aktoj

(De unges Forbund)

(1869)

Tradukis:

Odd Tangerud

(1999)

Eldonejo: JEC Scandinavia a/s

Postboks 54

N - 3401 Lier

Tlf. 32 85 50 03

Fax. 32 85 5082

## **LA ASOCIO DE LA JUNULOJ**

ROLOJ:

- ĈAMBELANO BRATSBERG, posedanto de ferfarejo.
- ERIK BRATSBERG, lia filo, jura kandidato kaj grandkomercisto.

- TORA, lia filino.
- SELMA, edzino de la grandkomercisto.
- DOKTORO FJELDBO, kuracisto ĉe la ferfarejo.
- ADVOKATO STENSGÅRD.
- PROPRIETULO MONSEN, sur “Storli” (lia bieno).
- BASTIAN MONSEN, lia filo.
- RAGNA, lia filino.
- TEOLOGIA KANDIDATO HELLE, hejminstruisto en “Storli”.
- FERFAREJA ADMINISTRANTO RINGDAL.
- BIENPOSEDANTO ANDERS LUNDESTAD.
- DANIEL HEJRE.
- SINJORINO RUNDHOLMEN, kampara komercistino.
- LIBROPRESISTO ASLAKSEN.
- SERVISTINO ĉe la ĉambelano.
- SERVISTO.
- KNABINO, dungitino ĉe sinjorino RUNDHOLMEN.
- VILAĜANOJ, GASTOJ de la ĈAMBELANO, k.t.p.

Å / å prononciĝas kiel longa o.

(La intrigo okazas ĉe la ferfarejo proksime al urbeto en suda Norvegio.)

## UNUA AKTO

(17-an de Majo.<sup>[1]</sup>) Popola festeno. Bosko apud la ĉefa domo. Muziko kaj danco en la fono; multkoloraj lampoj en la arboj. Meze, iom malantaŭe, pupitro; dekstre enirejo al granda tendo por regalado; antaŭ la sama estas tablo kun benkoj. Transe ĉe la alia flanko antaŭe estas alia tablo, ornamita per floroj kaj kun apogseĝoj ĉirkaŭe.)

[1] La nacia tago de Norvegio.

(Granda popolamaso. **Bienposedanto Lundestad**, kun komitata banto en la butontruo, staras sur la pupitro. La **ferfareja administranto Ringdal**, ankaŭ kun komitata banto, staras apud la tablo maldekstre.)

BIENPOSEDANTO LUNDESTAD

— — kaj tial, estimataj komunumanoj, toston por nia libereco! Tiel kiel ni prenis ĝin herede de niaj patroj, tiel ni volas konservi ĝin por niaj filoj! Hura por la tago! Hura por la 17-a de Majo!

AŬSKULTANTOJ

Hura, hura, hura!

FERFAREJA ADMINISTRANTO RINGDAL

(kiam **Lundestad** malsupren iras) Kaj nun hurao por maljuna Lundestad!

OPAJ VOĈOJ

TŜ! TŜ!

MULTAJ VOĈOJ

(superbruate) Hura por Lundestad! Maljuna Lundestad vivu! Hura!

(La aŭskultantoj disvastigas sin. **Proprietulo Monsen**, lia filo **Bastian**, **advokato Stensgård** kaj **libropresisto Aslaksen** premas sin antaŭen tra la amaso.)

MONSEN

Je mia savo li nun fariĝas antikva!

ASLAKSEN

Estis por niaj lokaj rilatoj, ke li parolis! Ho-ho!

MONSEN

Tiun paroladon li nun estas farinta ĉiujn tiujn jarojn, kiujn *mi* memoras. Venu do jen —!

STENSGÅRD

Ne-ne-ne! Ne tiun vojon, sinjoro Monsen! Nun ni ja tute malaperos por via filino.

MONSEN

Ho, Ragna certe retrovos nin.

BASTIAN

Al ŝi mankas nenio; kandidato Helle estas kun ŝi.

STENSGÅRD

Helle?

MONSEN

Jes, Helle. (puŝas lin amikece) Sed *mi* estas kun vi, vidu. Kaj ni ja ĉiuj estas. Venu do! Jen ni sidas ŝirmitaj kontraŭ ĉiu ajn; kaj ni povas paroli pli intime pri tio, kio — (dume li estas eksidinta ĉe la tablo maldekstre)

RINGDAL

(alvenas) Pardonu, sinjoro Monsen, — tiu tablo estas rezervita —

STENSGÅRD

Rezervita? Por kiu?

RINGDAL

Por la ĉambelano kaj la liaj.

STENSGÅRD

Ho ĉu, la ĉambelano kaj la liaj! Neniu el ili ja ĉeestas.

RINGDAL

Ne, sed ni povas atendi ilin ĉiun momenton.

STENSGÅRD

Ke ili eksidu aliloke. (prenas seĝon)

LUNDESTAD

(metas manon sur la seĝon) Ne, la seĝo staru, kiel dirite.

MONSEN

(ekstaras) Venu, sinjoro Stensgård! Jen estas same bona loko. (iras transen dekstren) Servisto! Hm, eĉ ne servisto. Tion la festenkomitato estus entempe prizorginta. Ho, Aslaksen, eniru kaj serĉu kvar botelojn da ĉampano. Postulu la plej multekostan. Diru ke Monsen pagos!

(Aslaksen iras en la tendon; la tri aliuloj eksidas.)

LUNDESTAD

(iras silenteme transen al ili, kaj turnas sin al **Stensgård**) Vi do ne prenu tion ĉi ĉagreniĝe —

MONSEN

Ne, ĉagreniĝe —! Je Dio! Fore de tio!

LUNDESTAD

(daŭre al **Stensgård**) Ĉar ja tute ne estas mi persone; estas la festenkomitato, kiu decidis —

MONSEN

Kompreneble. Al la festenkomitato decidi, kaj al ni obei —

LUNDESTAD

(kiel antaŭe) Ni estas ja ĉi tie sur la tereno de la ĉambelano. Li bonvole lasis al ni kaj la boskon kaj la ĝardenon por ĉi tiu vespero; kaj tial ni opiniis —

STENSGÅRD

Ni sidas bonege ĉi tie, sinjoro Lundestad, — se ni nur povos sidi neĝenate, — mi aludas la popolamason.

LUNDESTAD

(amike) Nu ja; do ĉio estas ja bona. (iras al la fono)

ASLAKSEN

(el la tendo) Nun baldaŭ venos la servisto kun la vino. (eksidas)

MONSEN

Propra tablo; — sub precipa superrigardo de la festen-komitato. Kaj tio eĉ en la libertago! Jen provo pri la tuta aranĝo.

STENSGÅRD

Sed je Dio, vi bonaj decaj homoj, — kial vi akceptas tiaĵon?

MONSEN

Malnova heredita kutimaĉo, sciu.

ASLAKSEN

Vi estas novulo ĉi tie en la distrikto, sinjoro advokato Stensgård. Sed se vi iomete konus niajn lokajn rilatojn, tiam —

SERVISTO

(alportas ĉampanon) Ĉi tie mendiĝis, — ĉu?

ASLAKSEN

Jes certe. Jen; enverŝu!

SERVISTO

(verŝas) Nu, estas ja je via konto, sinjoro Monsen?

MONSEN

Ĉio; estu tute trankvila. (La **servisto** foriras.)

MONSEN

(tostas kun **Stensgård**) Nu, bonvenon inter ni, sinjoro advokato! Ĝojigas min precipe

konatiĝi kun vi, kaj mi devas diri, ke estas honoro por la distrikto, ke tia viro kiel vi, ekloĝas ĉi tie. Ni multe legis pri vi en la gazetoj, kaj de kant-kunvenoj kaj aliaj kunvenoj. Sinjoro advokato Stensgård, vi havas grandan paroltalenton, kaj vi havas koron por la komuna bono. Ke vi nun vive kaj vigle okupiĝu en, — hm, — okupiĝu en —

ASLAKSEN

La lokaj rilatoj.

MONSEN

Ho jes, la lokaj rilatoj. Toston por ili! (ili trinkas.)

STENSGÅRD

Pri vivo kaj vigleco ne mankos!

MONSEN

Brave! Aŭdu! Kroman glason por tiu promeso!

STENSGÅRD

Ne; haltu; mi jam antaŭe —

MONSEN

Ho, babilaĵo! Kroman glason, mi diras; — Estas promespokalo!

(Ili tostas kaj denove trinkas; dum la sekvo **Bastian** fidele plenigas la glasojn.)

MONSEN

Krome, — ĉar ni nun hazarde enpensiĝis pri tiaj aferoj —, mi devas diri, ke ne estas precipe la ĉambelano, kiu premas ĉion sub la jugo. Ne, tiu kiu staras malantaŭe kaj stiras la sledon, tiu estas maljuna Lundestad, vi sciu!

STENSGÅRD

Jes, tion mi aŭdis el diversaj flankoj. Mi ne komprenas, ke tia liberulo —

MONSEN

Lundestad? Ĉu vi nomas Anders Lundestad liberulo? Jes, li efektive nomis sin tiel, en siaj junaj tagoj, kiam estis necese suprensvingi sin. Tial li ankaŭ akceptis la parlamentan seĝon herede post sia patro. Je Dio, ĉio ja iras herede ĉi tie.

STENSGÅRD

Sed devus ja esti eblo kvitigi sin je tiu ruzaĵo.

ASLAKSEN

Jes, morto kaj sufero, sinjoro advokato, — faru finon!

STENSGÅRD

Mi ja ne diras ke mi —

ASLAKSEN

Jes, ĝuste vi! Vi estas la viro. Vi havas viglan langon, kiel homoj diras; kaj vi havas tion, kio pli valoras: vi kapablas gazete polemiki. Mia gazeto estas libera por vi, tion vi scias.

MONSEN

Sed se io okazu, ĝi efektive okazu baldaŭ. La elekto de elektistoj okazos iun el ĉi tiuj tagoj.

STENSGÅRD

Kaj viaj multaj privataj aferoj ne estus malhelpo, se la elekto falus sur vin?

MONSEN

Miaj privataj aferoj certe suferus sub tio; sed se oni opinias, ke la komunuma bezono postulas ion tian, mi devus ja akcepti flankenmeti personajn konsiderojn.

STENSGÅRD

Nu ja, do estas bone. Kaj partion vi jam *havas*, tion mi bone rimarkis.

MONSEN

Mi flatas min, ke la plimulto de la juna agema kreskantaro —

ASLAKSEN

Hm, hm; estas kaŝesploruloj vagantaj.

DANIEL HEJRE

(el la tendo; miopa; ĉirkaŭrigardas kaj venas pliproksimen) Ho, ĉu mi kuraĝus prunte peti liberan seĝon; mi volus eksidi jen, tie.

MONSEN

Estas destinitaj benkoj, kiel vi vidas; sed ĉu vi ne povas sidi ĉe ĉi tiu tablo?

DANIEL HEJRE

Jen? Ĉe tiu tablo? Ho jes, certe! (eksidas) Jen, jen! ĉampana vino, mi kredas.

MONSEN

Jes. Vi eble kuntrinkos glason?

DANIEL HEJRE

Ne, dankon! Tiu ĉampano kiun sinjorino Rundholmen liveras, ĝi —; nu ja, etan glason mi ja povus pro la bona rondo — sed se mi nur *havus* glason.

MONSEN

Bastian, eniru serĉi unu.

BASTIAN

Ho, Aslaksen, eniru, kaj serĉu glason.

(**Aslaksen** iras en la tendon. Silento)

DANIEL HEJRE

La sinjoroj do ne ĝenas sin pro mi? Ne lasu min do ne —! Dankon, Aslaksen (salutas al **Stensgård**) Fremda vizaĝo. Nove veninta. Verŝajne advokato Stensgård, se mi ne eraras.

MONSEN

Tute ĝuste. (prezentante) Advokato Stensgård, sinjoro Daniel Hejre —

BASTIAN

Kapitalisto.

DANIEL HEJRE

Antaŭa, pli ĝuste dirite. Nun mi seniĝis je la tuto; kvitiĝis, oni povas ja diri. Ne bankrotis! Tion vi je morto kaj plago ne kredu.

MONSEN

Trinku, trinku nun, dum ŝaŭmas.

DANIEL HEJRE

Sed friponaĵoj, komprenu; artifikoj kaj tiaĵoj, — nu sufiĉe dirite. Nu do, mi esperas, ke tio estos preterpasanta. Kiam mi estos kvitiĝinta je miaj plej malnovaj procesoj kaj iuj aliaj aferoj, tiam la altedevena Mikelo estu tirata en tagon. Toston! Ĉu vi ne trinku por tio? Ĉu?

STENSGÅRD

Ja, ĉu mi ne unue demandu, kiu tiu altedevena sinjoro Mikelo estas?



DANIEL HEJRE

He-he; ne aspektu do tiel embarasita. Vi certe ne pensas, ke mi aludas al sinjoro Monsen? Sinjoro Monsen ja ne povas esti nomata altedevena. Ne; tiu estas ĉambelano Bratsberg, — kara juna amiko!

STENSGÅRD

Ho ĉu? En komercaj aferoj la ĉambelano certe estas honesta homo.

DANIEL HEJRE

Ĉu tion vi diras, vi juna homo? Hm; sufiĉe dirite! (proksimigas sin) Antaŭ dudeko da jaroj mi valoris barelon da oro. Ricevis grandan kapitalon post mia patro. Vi certe aŭdis rakonti pri mia patro? Ĉu ne? Maljuna Mads Hejre? Oni nomis lin Or-Mads. Li estis ŝipposedanto; enspezis multege da mono dum la licenc-tempo; orumigis siajn fenestrokadrojn kaj pordajn fostojn; estis sufiĉe riĉa por tio; nu sufiĉe dirite; — tial oni nomis lin Or-Mads.

ASLAKSEN

Ĉu li ne ankaŭ orumis la kamentubojn?

DANIEL HEJRE

Ne, tio estas nur gazetmensogo; — cetere ĝi aperis longe antaŭ via tempo. Sed monon li elspezis; kaj tion ankaŭ mi faris. Multekosta vojaĝo al Londono —; ĉu vi ne aŭdis paroli pri mia vojaĝo al Londono? Mi kvazaŭ kondukis kun mi kortegon; — ĉu vi vere ne aŭdis paroli pri tio? Ĉu? — Kaj kiom mi ja estas forĵetinta sur artojn kaj sciencojn? Kaj kiel mi ja estas antaŭenpuŝinta junajn talentulojn?

ASLAKSEN

(ekstaras) Dankon pri mi, miaj sinjoroj!

MONSEN

Nu? Ĉu vi volas forlasi nin?

ASLAKSEN

Jes, mi volas iom movi min. (foriras)

DANIEL HEJRE

(mallaŭte) Ankaŭ li estas unu el ili. Repagas sammaniere kiel ĉiuj la aliuloj; he-he! Ĉu vi scias, ke mi tenis lin tutan jaron al studado?

STENSGÅRD

Vere? Ĉu Aslaksen studis?

DANIEL HEJRE

Kiel la juna Monsen; — neniam fariĝis al io; ankaŭ kiel — sufiĉe dirite: — kion mi volis diri: devis rezigni la esperon pri li; jam frue rimarkis tiun fatalan inklinon al alkoholaĵoj —

MONSEN

Sed vi tute erarvojiĝis de tio, kion vi volis rakonti al Stensgård pri la ĉambelano.

DANIEL HEJRE

Aj, tio estas multflanka historio. Kiam mia patro staris plej alte, malsupreniĝis por la maljuna ĉambelano, — patro de la nuna, vi komprenas; ĉar ankaŭ *li* estis ĉambelano —

BASTIAN

Kompreneble; ĉio herediĝas ĉi tie.

DANIEL HEJRE

Inkluzive ĉiuj ĝentilaj ecoj. Sufiĉe dirite. La malaltigo de la mona valoro, — malprudentaĵoj, ekstravagancaj aferoj en kiujn li tiriĝis en la jaro 1816 kaj poste, tio devigis lin vendi parton el la bieno —

STENSGÅRD

Kaj via patro aĉetis?

DANIEL HEJRE

Kaj aĉetis kaj pagis. Nu! Kio okazas? Mi transprenas la heredaĵon; mi faras milojn da plibonigaĵoj —

BASTIAN

Kompreneble.

DANIEL HEJRE

Toston! — Plibonigaĵojn en miloj, kiel dirite; mi aerumas en la arbaroj; vico da jaroj pasas, — kaj jen venas mia sinjoro Urian,<sup>[2]</sup> — mi aludas la nunan, — kaj igas la negocon refariĝi!

[2] Nomo uzata por ne devi uzi la ĝustan. Malestime.

STENSGÅRD

Jes, sed estimata Hejre, tion vi certe estus povinta malhelpi.

DANIEL HEJRE

Ne tiel facile! Kelkaj formalajtoj estis forgesitaj, li pretendis. Cetere mi tiam estis en mona embaraso, kiu laŭe fariĝis daŭra. Kaj kiom longe atingas ni nuntempe sen kapitalo?

MONSEN

Ne, jen estas je Dio vera vorto! Jes, iel oni ne atingas longe eĉ *kun* kapitaloj. Tion mi spertis. Jes, eĉ miaj senkulpaj infanoj —

BASTIAN

(frapas la tablon) Uŝ, patro, — se mi havus certajn personojn ĉi tie!

STENSGÅRD

Viaj infanoj, vi diras?

MONSEN

Nu jes; vidu nun ekzemple Bastian. Ĉu li ne estas bone edukita —?

DANIEL HEJRE

Trioble! Unue en direkto de studento; poste en direkto de pentristo; kaj fine en direkto de — ne, jeno estas vero, — civilinĝeniero, *tio* li do estas.

BASTIAN

Jes, tio mi estas, morto kaj plago!

MONSEN

Jes, tio li estas; tion mi povas pruvi kaj per kvitancoj kaj ekzamenaj atestiloj. Sed kiu dungiĝis por la komunuma laboro? Kiu dungiĝis por la vojlaboroj ĉi tie — precipe la du lastajn jarojn? Por ili dungiĝis eksterlandanoj — aŭ almenaŭ fremduloj, — personoj, mallonge dirite, pri kiuj oni nenion scias!

DANIEL HEJRE

Jes, estas tute hontinde. Kiam oni je novjaro dungus estron de la ŝparbanko, oni preterpasis sinjoron Monsen, kaj elektis subjekton kun komprenemo (tudas) kun komprenemo teni la monujon fermita, — kion nia grandioza gastiganto laŭŝajne ne havas. Se temas pri posto de konfido en la komunumo — same! Neniam Monsen; ĉiam iu kiu ĝuas la fidon — de la potenculoj. Nu; *commune suffragium*, kiel vortumas la roma leĝaro; tio signifas, ke oni suferas ŝiprompon en la komunuma profesio, vi sciu! Fi, pro diablo! Tosto!

MONSEN

Dankon! Sed por pasi al io alia, — kiel progresas nun viaj multaj procesoj?

DANIEL HEJRE

Ili daŭre estas en preparado; mi ne povas diri pli al vi je ĉi tiu momento. Ho, kiom da ĉikanoj al kiuj mi estis elmetita en tiu rilato! Venontan semajnon fariĝos necese por mi voki la tutan urban konsilantaron al la juĝa konsilantaro.

BASTIAN

Ĉu estas vero, tio kion diras homoj, ke vi iam vokis vin mem al la juĝa konsilantaro?

DANIEL HEJRE

Mi mem? Jes; sed mi ne min prezentis.

MONSEN

Ha-ha! Ĉu ne, nu?

DANIEL HEJRE

Mi havis leĝan ekskuzon pri foresto: Mi transpasus la Grönsundon, kaj malfeliĉe estis, ke estis tiun jaron ke Bastian konstruis la ponton; — pum; vi scias ke iris *ad undas* —

BASTIAN

Nu, do ke la diablo —!

DANIEL HEJRE

Prudento, juna sinjoro! Estas tiom multaj, kiuj streĉas la arkon ĝis ĝi rompiĝas; la pontan arkon mi aludas; ĉio estas ja hereda —; sufiĉe dirite!<sup>[3]</sup>

[3] En la norvega lingvo ĉi tiu esprimo signifas ankaŭ “stultulo”.

MONSEN

Ho-ho-ho! “Sufiĉedirite”, jes! Trinku nun vi, “Sufiĉedirite”! (al *Stensgård*) Vi aŭdas, ke sinjoro Hejre havas licencon por esprimi sin kiel li ŝatas.

DANIEL HEJRE

Jes, la parolibereco estas ja la sola ŝtataneca rajto, kiun mi alte taksas.

STENSGÅRD

Nur domaĝo, ke tiu rajto estas limigita per la leĝoj.

DANIEL HEJRE

He-he! La dentoj de la sinjoro advokato eble salivas por insultproceso? Ĉu? Nepre ne akceptu toleraĵon, estimatulo! Mi estas maljuna praktikanto, mi!

STENSGÅRD

Koncerne insultoj?

DANIEL HEJRE

Vian pardonon, juna sinjoro! La kolero, kiun vi sentas, vere honorigas vian koron. Mi petas vin forgesi, ke maljunulo estas ĉi tie sidinta parolante nekaŝeme pri viaj forestantaj amikoj.

STENSGÅRD

Forestantaj amikoj?

DANIEL HEJRE

La filo certe valoras la honoron; sufiĉe dirite! Tiel ankaŭ la filino. Kaj kiam mi preterpase hazardis ĵeti makuleton sur la karakteron de la ĉambelano —

STENSGÅRD

Tiuj de la ĉambelano? Ĉu estas tiuj de la ĉambelano, kiujn vi nomas miajn amikojn?

DANIEL HEJRE

Jes, oni ja ne faras vizitojn al siaj malamikoj, mi scias.

BASTIAN

Vizitojn?

MONSEN

Ĉu kio?

DANIEL HEJRE

Aŭ, aŭ, aŭ! Jen mi eble malkaŝis ion, kio —

MONSEN

Ĉu vi faris vizitojn al la ĉambelano!

STENSGÅRD

Babilaĵo! Falsaĵoj!

DANIEL HEJRE

Vere, ege fatale! Sed kiel mi do povus scieti, ke estas sekreto? (al **Monsen**) Cetere ne prenu miajn vortojn tro laŭlitere. Kiam mi diras “vizito”, mi nur aludas tian formalan viziteton; — tamen en frako kaj flavaj gantoj; sed kio —!

STENSGÅRD

Kaj mi diras al vi, ke mi eĉ ne estas parolinta vivan vorton kun tiu familio!

DANIEL HEJRE

Ĉu eblas? Ĉu vi eĉ ne la duan fojon estis akceptata? Jes, ĉar la unuan fojon oni neigis sin hejme; tion mi ja scias.

STENSGÅRD

(al Monsen) Mi havis skribaĵon por transdoni de iu tria persono en Kristiania; tio estas la tuto.

DANIEL HEJRE

(ekstaras) Estas, Dio mortigu min, io indigniga en tiaĵo! Jen venas juna, fidema nespertulo sur la areno de la vivo; vizitante la provitan grandulon en lia domo; rifuĝas al li kiu havas la sian en sekureco, por peti, — nu sufiĉas! La grandulo ŝlosfrapas la pordon; oni ne estas hejme; — ne, oni neniam estas hejme, kiam pri io estas, — sufiĉas! (ekdire) Sed aldone estas ja la plej indigniga krudeco!

STENSGÅRD

Ho, lasu nun tiun malagrablan aferon kuŝi.

DANIEL HEJRE

Ne hejme! Li, kiu ĉiam diradas: “Mi estas ĉiam hejme por honestaj homoj!”

STENSGÅRD

Ĉu li tion diras?

DANIEL HEJRE

Ia diraĵo. Eĉ sinjoro Monsen neniam akceptiĝas. Sed mi ne komprenas kial li portas malamon al vi. Jes, mi diras malamon; ĉar ĉu vi scias kion mi aŭdis hieraŭ?

STENSGÅRD

Mi ne volas scii, kion vi aŭdis hieraŭ.

DANIEL HEJRE

Fina punkto do. Cetere la diraĵo por mi ne estis eksterordinara; — nome en la buŝo de ĉambelano Bratsberg! Mi ne komprenas, kial li aldonus la vorton “radik-hakisto”.

STENSGÅRD

Radik-hakisto?

DANIEL HEJRE

Ĉar vi nepre devigas min, mi devas konfesi, ke la ĉambelano nomis vin radik-hakisto kaj aventuristo.

STENSGÅRD

(eksaltas) Kion do?

DANIEL HEJRE

Radik-hakisto kaj aventuristo, — aŭ aventuristo kaj radik-hakisto, mi ne povas garantii por la vico de la vortoj.

STENSGÅRD

Kaj tion vi aŭdis?

DANIEL HEJRE

Mi? Se mi ĉeestus, sinjoro advokato Stensgård, ne mankus al vi la defendon, kiun vi meritas.

MONSEN

Jen vi vidas kio elvenas el —

STENSGÅRD

Kiel povas tiu impertinenta persono arogi al si —?

DANIEL HEJRE

Nu, nu, nu! Ne tiel impete! Estis metafore pensite; pri tio mi vetas mian kolon. Eble nur ŝercema parolturniĝo. Morgaŭ vi povos postuli klarigon. Jes, ĉar vi ja certe invitiĝis al la festena tagmanĝo? Ĉu?

STENSGÅRD

Mi ne iros al iu tagmanĝo.

DANIEL HEJRE

Du vizitojn kaj tamen neniun inviton —!

STENSGÅRD

Radik-hakisto kaj aventuristo! Al kio tio do aludus?

MONSEN

Jen vidu tien! Kiam oni parolas pri la malbonulo, li estas plej proksima. Venu, Bastian! (**Monsen** kaj **Bastian** foriras.)

STENSGÅRD

Kion tio signifus, sinjoro Hejre?

DANIEL HEJRE

Mi vere ne povas servi vin per iu respondo, — Vi suferas? Vian manon, juna sinjoro! Pardonu se mi per sincerdireco vundis vin. KREDU min, ankoraŭ atendas vin multaj amaraj travivaĵoj sur la areno de la vivo. Vi estas juna; vi estas konfidema kaj kredema. Tio estas bela; eĉ kortuŝa; sed, sed, — fidemo estas arĝento; monda sperto estas oro; — jen proverbo el mia propra elpenŝaĵo, vidu! Dio estu kun vi! (**Daniel Hejre** foriras.)

(Ĉambelano Bratsberg, lia filino kaj doktoro Fjeldbo venas de maldekstre.)

ANDERS LUNDESTAD

(ĉe la tribuno, signas por aŭskultado) Sinjoro administranto de la ferfarejo Ringdal havas la vorton.

STENSGÅRD

(vokas) Sinjoro Lundestad, mi postulas la vorton!

LUNDESTAD

Poste!

STENSGÅRD

Ne! — Nun! Tuj!

LUNDESTAD

Vi ne povas paroli nun. Sinjoro Ringdal havas la parolrajton.

RINGDAL

(sur la tribuno) Estimataj kunvenantoj! En ĉi tiu momento ni havas la honoron vidi en nia mezo la viron kun la varma koro kaj la malfermita mano, — li, kiu dum longa vico da jaroj kutimigis nin suprenrigardi al li kvazaŭ al patro; li, kiu ĉiam estas preta same al konsilo kiel al faro; li, kies pordo neniam estas fermita por iu ajn honesta membro de nia komunumo; li, li —; nia estimata honora gasto ne ŝatas longajn paroladojn, kaj tial, toston kaj huraon por ĉambelano Bratsberg kaj lia familio! Ili vivu! Hura!

LA AMASO

Hura! Hura! Hura!

(Entuziasma aplaŭdo; oni ĉirkaŭas la ĉambelanon, kiu dankas kaj premas la manojn de la plej proksimaj.)



STENSGÅRD

Ĉu mi *nun* rajtas paroli?

LUNDESTAD

Bonvolu. La tribuno staras je via servo.

STENSGÅRD

(eksaltas sur la tablon) Mi konstruas mian propran tribunon!

LA JUNULOJ

(amasigās ĉirkaŭ lin) Hura!

LA ĈAMBELANO

(al la **doktoro**) Kiu estas tiu neregula homo?

FJELDBO

Advokato Stensgård.

LA ĈAMBELANO

Nu, li!

STENSGÅRD

Aŭskultu min, vi festenantaj fratoj kaj fratinoj! Aŭskultu min, vi, kiuj havas la ĝojon kaj la kanton de la tago de libereco en viaj koroj, eĉ se ĝi kuŝas ligita. Mi estas fremdulo inter vi —

ASLAKSEN

Ne!

STENSGÅRD

Dankon por tiu “ne”! Mi prenas ĝin kiel atesto de la sopiro kaj la bezono. Tamen fremda mi estas; sed estas ĵurite, ke ĉi tie mi staras kun granda kaj freŝa koro por via lamento kaj ĝojo, por via sopiro kaj venko; se havus mi pri tio iun potencon, tiam — tiam —!

ASLAKSEN

Vi *havas*, sinjoro advokato!

LUNDESTAD

Neniu interrompo! Vi ne havas la parolrajton.

STENSGÅRD

Vi eĉ malpli! Mi maldungas la festenkomitaton! Libereco en la liberecotago, knaboj!

LA JUNULOJ

Hura por la libereco!

STENSGÅRD

Oni volas malpermesi al vi paroli! Vi aŭdis. Oni volas fari vin senvoĉaj! For tia perforta reĝimo! Mi ne volas stari ĉi tie parolante al amaso de mutuloj. Paroli mi volas. Kaj vi parolu kune. Ni parolu sen ĉirkaŭfrazoj!

LA AMASO

(en kreskanta ĝojego) Hura!

STENSGÅRD

Ne plu tiuj sterilaj ĉerke vestitaj festenkunvenoj! Orumita, agpeza rikoltaĵo ĝermos de nun el niaj Deksepan-de-Majo-festenoj. Majo! Ĝi estas ja la tempo de ĝermado; ĝi estas ja la juna ŝvelanta virginmonato de la jaro. Ĝis la unua de Junio estos ĝuste du monatoj de post kiam mi loĝiĝis ĉi tie inter vi. Kaj kiom do mi estas vidinta de grandeco kaj malgrandeco, de malbelaĵoj kaj de belaĵoj ĉi tie!

LA ĈAMBELANO

Pri kio estas li vere parolanta, doktoro?

FJELDBO

Presisto Aslaksen diras, ke estas pri la lokaj rilatoj.

STENSGÅRD

Mi vidis talentojn glimi kaj brili funde en la popolo. Sed mi ankaŭ vidis la degenerigantan animon, kiu kuŝas premegante super la talentoj kaj tenas ilin en la malsupereco. Jes, mi vidis junajn, varmajn, fidoplenajn korojn alkuri renkonte, — sed ankaŭ tiujn, kiuj fermis la pordon al ili.

TORA

Ho, Dio!

LA ĈAMBELANO

Kion li aludas per tio?

STENSGÅRD

Jes, fratoj kaj fratinoj en brava fido! Troviĝas en la vetero, en la aero, potenco,

reaperanto el putraj tagoj, kiu diskuŝigas premegon kaj sombron, kie devus esti lumo kaj suprenflugo. Reentombigu tiun reaperanton!

LA AMASO

Hura! Hura por la 17-a de Majo!

TORA

Venu, patro —!

LA ĈAMBELANO

Je la diablo, pri kiu reaperanto estas li parolanta, doktoro?

FJELDBO

(rapide) Ho, estas pri — (flustras kelkajn vortojn)

LA ĈAMBELANO

Aha! Ĉu vere tiel?

TORA

(mallaŭte) Dankon!

STENSGÅRD

Se ne aliulo volas frakasi la drakon, do mi faros! Sed ni devas kunteni, knaboj!

MULTAJ VOĈOJ

Jes! Jes!

STENSGÅRD

Ni estas la junuloj. Ni posedas la tempon; sed la tempo ankaŭ posedas nin. Nia rajto estas nia devo! Kubutlokon por ĉia energio, por ĉia volo, kiu estas el inter la fortuloj! Aŭskultu min! Ni starigos asocion. La monsako ĉesis regi en la komunumo!

LA ĈAMBELANO

Brave! (al la doktoro) La monsakon, li diris; do tamen vere —!

STENSGÅRD

Jes, knaboj, ni, ni estas la valuto, se vere estas erco en ni. Niaj volo, jen la kontanta mono, kiu validu inter homo kaj homo. Milito kaj malvenko al ĉiuj tiuj, kiuj volas malhelpi ke ni antaŭen iros laŭ nia volo.

LA AMASO

Hura!

STENSGÅRD

Oni ĵetis al mi vizaĝen mokeman “brave” ĉi-vespere —

LA ĈAMBELANO

Ne!

STENSGÅRD

Indiferente! Nek danko nek minaco ion signifas por tiu kiu volas tion, kion li volas.

Kaj sekve al Dio rekomendita! Jes al li; ĉar estas ja lia misio, kiun ni plenumas en nia juna, fidoplena agado. Do internen en la restoracion; — en tiu ĉi horo ni volas starigi nian asocion!

LA AMASO

Hura! Portu lin! Portu lin!

(Li suprenleviĝas sur kunplektitaj brakoj.)

VOĈOJ

Parolu! Pli! Pli!

STENSGÅRD

Solidareco, mi diras! Alianco estas inter la asocio de la junuloj kaj la providenco.

Dependas de ni, se ni volas estri la mondon — ĉi tie en la distrikto!

(Li portiĝas en la tendon dum entuziasma aplaŭdo.)

SINJORINO RUNDHOLMEN

(sekigas la okulojn) Ho, kia buŝo sidas sur tiu homo! Ĉu oni ne ŝatus kisi lin, sinjoro Hejre?

DANIEL HEJRE

Ne, kisi lin, tion mi do ne volonte farus.

SINJORINO RUNDHOLMEN

Ne, vi! Tion mi ja kredas.

DANIEL HEJRE

Ĉu eble vi volus kisi lin, sinjorino Rundholmen?

SINJORINO RUNDHOLMEN

Uf, kiel aĉa vi estas!

(Ŝi iras en la tendon; ankaŭ **Daniel Hejre**.)

LA ĈAMBELANO

Reaperanto, — kaj drako, — kaj monsako! Estis terure krude. Sed certe konvene!

LUNDESTAD

(proksimiĝas) Mi tre bedaŭras, sinjoro ĉambelano —

LA ĈAMBELANO

Jes, kie vi havis vian scion pri la homoj? Nu, nu; povas okazi al kiu ajn. Bonan nokton, sinjoro Lundestad, kaj multajn dankojn por hodiaŭ. (turnas sin al **Tora** kaj al **la doktoro**) Sed je diablo; kontraŭ tiu brava, juna homo mi estas estinta kruda.

FJELDBO

Ĉu?

TORA

Al la vizito vi aludas —?

LA ĈAMBELANO

Du vizitoj. Efektive estas la kulpo de Lundestad; li estis lin priskribinta kiel ambiciulo kaj kiel — io alia, kion mi ne memoras. Nu, feliĉe ke mi povos tion ripari.

TORA

Kiel —?

LA ĈAMBELANO

Venu, Tora; ni volas jam ĉi-vespere —

FJELDBO

Ho ne, sinjoro ĉambelano, ĉu tio do estas prudenta —?

TORA

(mallaŭte) Tŝ!

LA ĈAMBELANO

Se oni estis senatenta, oni devas ripari la aferon; tio estas simpla devo. Bonan nokton, doktoro! Mi tamen ekhavis ĝojigan tempeton. Tio estas pli ol vi pretigis por mi hodiaŭ.

FJELDBO

Mi, sinjoro ĉambelano?

LA ĈAMBELANO

Ho jes, jes jes; — kaj vi kaj aliuloj —

FJELDBO

Ĉu mi povus demandi, kion mi —?

LA ĈAMBELANO

Sinjoro farejkuracisto, — neniun altrudiĝemon. Mi neniam estas altrudiĝema. Nu, tamen, en la nomo de Dio, — bonan nokton.

(La ĉambelano kaj **Tora** eliras maldekstre; **Fjeldbo** postrigardas ilin penseme.)

PRESISTO ASLAKSEN

(el la tendo) Hola, servisto! Inkon kaj plumon! Ho, nun okaziĝas, sinjoro doktoro!

FJELDBO

Kio okaziĝas?

ASLAKSEN

Li starigas la asocion. Ĝi estas preskaŭ starigita.

LUNDESTAD

(malrapide proksimiĝas) Ĉu multaj enskribiĝas?

ASLAKSEN

Ni havas nun ĉirkaŭ 37 krom vidvinoj kaj tiaĵoj. Inkon kaj plumon, mi diras! Neniu servisto ĉeestas; kulpas la lokaj rilatoj. (eliras malantaŭ la tendon)

LUNDESTAD

Puh; tio ĉi estis varma tago.

FJELDBO

Mi timas ke ni havos pli varmajn tagojn post ĉi tiu.

LUNDESTAD

Ĉu vi opinias ke la ĉambelano fariĝis tre kolera?

FJELDBO

Ho, tute ne; tion vi ja vidis. Sed kion vi diras pri la nova asocio?

LUNDESTAD

Hm; mi diras nenion. Kion do diri?

FJELDBO

Sed estas ja la komenco de batalo por la potenco ĉi tie en la distrikto.

LUNDESTAD

Nu ja! Batalo estas bona. Li estas viro kun grandaj talentoj, tiu Stensgård.

FJELDBO

Kaj viro kiu volas antaŭen.

LUNDESTAD

La junuloj ĉiam volas antaŭen. Ankaŭ mi volis antaŭen, kiam mi estis juna; nenio estas direnda kontraŭ tio. Sed ni povus eble iri internen —

DANIEL HEJRE

(el la tendo) Nu, sinjoro Lundestad, ĉu vi eniros por interpelacii? Ĉu? Fari oponon? He-he! Ĉar tiaokaze vi devas rapidiĝi.

LUNDESTAD

Ho, mi tamen certe venos sufiĉe frue.

DANIEL HEJRE

Tro malfrue, amiko! Se vi ne volas stari baptopatro. (huraĵoj el la tendo) Jen la diakonoj kantas Amenon; nun la bapta ceremonio estas plenumita.

LUNDESTAD

Certe permesiĝas ke oni aŭskultu; mi tenas min silenta. (eniras)

DANIEL HEJRE

Jen ankaŭ unu el la falontaj arboj! Multo kaj multuloj estas nun falontaj! Ĉi tie aspektos kiel arbaro post ventego. Ho, estas delikate, jeno!

FJELDBO

Sed diru al mi, sinjoro Hejre; kial ĝi vere interesas vin?

DANIEL HEJRE

Interesas min? Mi ne estas iu interesprenanta viro, sinjoro doktoro! Kiam mi ĝojas, tio estas en la nomo de miaj kuncivitanoj. Ĉi tie kreiĝos vivo, enhavo, materio! Por mi persone — je Dio, por mi tio povas esti sensignifa; mi diras, kiel la Granda Turko pri la imperiestro de Aŭstrujo kaj la reĝo de Francio: Por mi estas sensignife ĉu la porko manĝas la hundon aŭ ĉu la hundo manĝas la porkon. (eliras en la fono dekstre)

LA AMASO

(en la tendo) Advokato Stensgård vivu! Li vivu! Hura! Hura por la Asocio de la junuloj!  
Vino! Punĉon! Hoj; hoj! Bieron! Hura!

BASTIAN MONSEN

(el la tendo) Dio benu vin kaj ĉiujn homojn! (kun plorsufokata voĉo) Ho, doktoro, mi sentas  
min fortega ĉi-vespere. Mi devas ion fari!

FJELDBO

Ne faru ceremoniojn. Sed *kion* volas vi fari?

BASTIAN MONSEN

Mi pensas, ke mi iru en la danc-salonon por draŝi kelkajn el miaj amikoj. (elen malantaŭ  
la tendon)

(Stensgård venas el la tendo, sen ĉapelo kaj en forta ekscito.)

STENSGÅRD

Kara Fjeldbo, ĉu estas vi?

FJELDBO

Je via servo, sinjoro popolestro! Nu, vi certe estas elektita —?

STENSGÅRD

Kompreneble; sed —

FJELDBO

Kaj kio sekvu poste el tio ĉi? Kiuj postenoj de konfido en la komunumo? Estro en la  
banko? Aŭ eble —?

STENSGÅRD

Ho, ne parolu al mi pri tiaĵoj! Vi ankaŭ ne pensas tiel. Vi ne estas tiel plata kaj  
malplena en la brusto, kiel vi deziras aspekti.

FJELDBO

Jen io por aŭdi!

STENSGÅRD

Fjeldbo! Estu mia amiko kiel antaŭe! Fariĝis dezerte inter ni. Estis tiom da  
malĝojigaĵoj ĉe vi, ŝercemo, moko, kiuj forpuŝis min. Ho, estis do maljuste de  
mi! (ĉirkaŭbrakas lin) Ho, vi eterna Dio, kiom feliĉa mi estas!



FJELDBO

Ankaŭ vi! Eĉ mi; eĉ mi!

STENSGÅRD

Jes, ĉu mi ne estus la plej fia fripono sur la tero, se tiu apogo de beno ne faris min bona kaj brava? Per kio mi estas tion meritinta, amiko? Kion mi, sentaŭgulo, estas farinta, ke mi fariĝis tiel riĉigata?

FJELDBO

Jen mia mano! Ĉi-vespere mi, je mia savo, ŝatas vin!

STENSGÅRD

Dankon! Estu fidela kaj sincera. Mi estu. — Ĉu ne estas nedirebla feliĉo tiel povante entuziasmigi ĉiujn, ĉiujn el la amaso? Ĉu oni ne fariĝu bona el dankemo? Kaj ĉu oni ne devas ami ĉiujn homojn? Ŝajnas al mi, ke mi povus premegi ĉiujn al mi, plori kaj pardonpeti por pardono, ĉar Dio estis tiel partia por doni al mi pli ol al ili.

FJELDBO

(silente) Jes; tiom nedireble multe povas la opulo ricevi. Eĉ ne rampulo, eĉ ne verda folio laŭ la vojo povus mi subtreli ĉi-vespere.

STENSGÅRD

Vi?

FJELDBO

Fina punkto! Pri tio ne estas la parolo. Mi nur volis diri, ke mi komprenas vin.

STENSGÅRD

Ho, kia delikata nokto! La muziko kaj la ĝojo sonas foren super la herbejoj. Tie malsupre estas silente. — Jes, tiu homo, kies vivo ne akceptas bapton el tia horo, li ne meritas vivi sur la tero de Dio.

FJELDBO

Jes, sed diru nun, — kio konstruiĝos poste — morgaŭ kaj ĉiujn labortagojn?

STENSGÅRD

Konstruiĝos? Unue temas pri malkonstruo. — Vi, Fjeldbo, mi iam sonĝis, — aŭ eble mi tion vidis; tamen ne, mi sonĝis; sed tie